


# STARTO

**N-ro 3/2008 (228)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**Naskiĝas nova Esperanto-Muzeo en Svitavy  
La urbestro de Svitavy Jiří Brýdl  
kaj prezidantino de ĈEA Jana Melichárková  
tostas ĉe la busto de la Majstro**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IČ:** 00 44 30 34

**rete Starto:** malovec@volny.cz,

**rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)  
melicharkova8@seznam.cz (prezidanto)  
www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisiono de ĈEA:** pedagogia

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentace ĈES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, ĈEA-retkomunikoj)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz (členská základna, účetnictví)

**Komitatano:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

**Komitatano:** Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz, (sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karesová, Havlíčково nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

## Kontrolgrupo de ĈEA:

**Prezidanto:** Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., stepanova.v@kr-ustecky.cz;

Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Richard Howard, Pavel Polnický

## 93-a Universala Kongreso

*En la jubilea jaro de UEA ĝi ne povis okazi aliloke ol en la sidejo de UEA, nome en Roterdamo, kvankam ne en la UEA-domo. Venis 1845 partoprenantoj el 75 landoj. La kongresa temo: **Lingvoj - trezoro de la homaro.***

*Post la ĉefparolantoj, Probal Daŝgupto kiel UEA-prezidanto kaj Humphrey Tonkin pri la kongresa temo, salutis unuopaj nacioj. Nome de ĉeĥaj esperantistoj salutis la kongreson estro de nia junularo Marek Blahuš, kiu rakontas pri sia travivaĵo:*

Al la Universala Kongreso mi ĉi-jare vojaĝis trajne, tra Germanio, kune kun du junaj esperantistinoj, Eva el Prago kaj Paulínka el Bratislavo. Ĉar junulo, mi sekvis tie ankaŭ la Junularan Programon, kadre de kiu okazis i.a. speciala koncerto, diskoteko, projekciado de filmoj kaj merkrede tuttaga ekskurso al Delfto, Hago kaj la Norda Maro.

Ceterajn junularajn aktivaĵojn mi tamen lasis por la tujsekva IJK kaj partoprenis aktive ankaŭ en la ĉefa programo. El tiu mi aparte ŝatis la prelegojn pri Nederlando (lingvokurso, prelego pri diferencoj inter la nederlanda kaj la flandra...), ĉar mi septembre alvenos studi al la apudlando Belgio.

Pro faka interesiĝo mi sekvis

kelkajn prelegojn de la Esperantologia konferenco kaj precipe helpis kunorganizi la Lingvistik-softwaren renkontejon - dufojan sesion de prelegoj kaj diskutoj por komputil-lingvistoj. Plej grava tago de la kongreso por mi estis la vendredo, ĉar tiam mi kadre de la renkontejo prezentis mian bakalaŭran studlaboraĵon "Literumkontrolilo por Esperanto", antaŭ nelonge defenditan ĉe la Masaryk-Universitato. Ironie, en sama tempo kiam mi en Roterdamo prelegis, en Brno estis okazanta promocio de miaj kunstudintoj, ĉe kiu mi tial devis manki.

La venonta UK okazos en Pollando, kaj tio montriĝis taŭga okazo, por ke Ĉeĥa Esperanto-Junularo - helpe de junuloj el Germanio kaj Pollando - organizu konekte al ĝi la Internacian Junularan Kongreson - unuafoje en historio en nia lando. Pri la venontjara renkontiĝo mi dum la UK informis kadre de la programero "TEJO sin prezentas" kaj dank' al Petro Chrdle havis okazon inviti al ĝi ankaŭ ĉiujn kongresanojn kiel landa salutanto dum la solena malfermo. La 65-a IJK okazos inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en Liberec.

*Marek Blahuš*

## MESAĜO DE UNESKO AL LA 93-A UK

Ĉi tiu kongreso okazas je tute taŭga momento: duone tra la Inter-



nacia Jaro de Lingvoj 2008. Kiel esenca dimensio de homa ekzistado, lingvoj ĉiam estis en la kerno de la misio de Unesko, kaj ni ludas gvidan rolon en la kunord-

igado de agadoj tra la jaro. Fakte, lingvoj estas menciitaj en la unua artikolo de nia Konstitucio, kiu diras ke la celo de la organizo estas "kontribui al paco kaj sekureco, stimulantante kunlaboradon inter la nacioj per edukado, scienco kaj kulturo por antaŭenigi universalan respekton por justeco, por la regado de leĝoj kaj por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj (...) sendistinge pri raso, sekso, lingvo aŭ religio."

Ĉi tiu vizio daŭre gvidas la laboron de la organizo, kaj je la labora kaj je la normiga niveloj, en ĉiuj niaj kampoj de kompetento: edukado, sciencoj, kulturo kaj komunikado. Ni laboras por antaŭenigi plurlingvan edukadon kaj multlingvismon en cibera spaco, por savi endanĝerigitajn lingvojn, plifortigi indiĝenajn lingvojn kiel portilojn de

sciencia scio kaj scipovo, kaj por analizi la ligojn inter la praktikado de lingvoj kaj sociaj transformiĝoj. Nian agadon en la kampo de lingvoj antaŭnelonge plifortigis la kreado de Intersektora Platformo por Lingvoj kaj Multlingvismo.

Plie, Unesko laŭ sia propra naturo estas multlingva organizo: niaj gvidaj organoj laboras per naŭ lingvoj, kaj multaj paĝoj kaj temoj en nia Unesko-retejo estas seslingvaj.

Estante centra por la identeco de individuoj kaj reprezentante strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, multlingvismo estas nuntempe, en epoko de tutmondiĝo, pli ol iam ajn ŝlosila temo por la estonteco de la homaro. Tial la slogano, kiun ni kreis por la Internacia Jaro de Lingvoj esprimas klare sed elokvente, ke "lingvoj gravas".

Kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kongreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco.

Tial mi deziras al Universala Esperanto-Asocio, al la organizantoj de la kongreso kaj al ĉiuj partoprenantoj plenan sukceson en iliaj diskutadoj.

*Koichiro Matsuura*  
*Ĝenerala Direktoro de Unesko*

## **SIMO MILOJEVIĆ** **HONORA MEMBRO DE UEA**

En la inaŭguro de la 93-a UK la publiko bonvenigis per forta kaj longa aplaŭdo la decidon de la Komitato de UEA elekti s-ron *Simo Milojević* kiel Honoran Membron de UEA.

*Simo Milojević* naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino), Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto", poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando *Milojević* redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74). En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de "Esperanto" (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj labori kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA, de 1996 ĝis la fino de 2002, kiam li pensiĝis. Ekde la fino de 2007 li vivas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino).

## **PREMIO DEGUĈI AL** **RENATO CORSETTI**

En la fermo de la 93-a UK estis anoncitaj diversaj premioj kaj distingoj. La plej prestiĝan el ili, Premion Onisaburo Deguĉi, ricevis *Renato Corsetti*.

Premio Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto por ĉiujare premii agadon, kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidaron en la spirito de *Lazaro Ludoviko Zamenhof* kaj *Onisaburo Deguĉi*. Pri la ricevanto de la Premio decidas la Estraro de UEA. La Premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Aljuĝante la Premion la Estraro de UEA skribis: "*Renato Corsetti* estas unu el la plej elstaraj agantoj de Universala Esperanto-Asocio. Por li Esperanto estis ĉiam nedisigeble ligita al agado por pli bona mondo, por internacia amikeco, solidaro kaj paco. Antaŭenigi tiujn idealojn signifas al li antaŭenigi Esperanton, kaj tute aparte, disvastigi ĝin precipe al tiuj partoj de la mondo, kie la Internacia Lingvo apenaŭ aŭ tute ne havas adeptojn. Tio instigis lin al pionira laboro por krei Esperanto-movadon en multaj landoj de la Tria Mondo, precipe en Afriko kaj arabaj landoj, ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritaj horizontoj kaj por persona kresko."

## LERNU.NET kaj EDUKADO.NET DIPLOMITAJ

La Estraro de UEA rajtas rekoni eksterordinare meritplenan agadon por la Internacia Lingvo per Diploma pri Elstara Agado. La Diploma estis starigita pasintjare. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: **lernu.net** kaj **edukado.net**.

**lernu.net** estas plurlingva paĝaro, kiu estis lanĉita en 2002 kaj celas helpi al ret-uzantoj informiĝi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. Verŝajne ne estas troigo diri, ke nuntempe ĝi estas la plej granda lernejo de Esperanto en la mondo. Ĝi estas vizitata averaĝe 75.000 fojojn monate. Ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 lernantoj finis ĝian lastan, okan parton.

**edukado.net** estas retejo por instruistoj, prizorgata de *Katalin Kováts*. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. Ĝi estis lanĉita en 2001 kaj renovigita en 2005. En la retejo troviĝas i.a. katalogo de lerniloj, "lerniloteko" por interŝanĝi ekzercojn kaj testojn, legejo de lernosubtenaj materialoj, koresponda servo, ktp. La teamo de edukado.net liveris nemalhaveblan helpon por realigi la Esperantan version de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvo-ekzamenoj kaj de kelkaj jaroj prizorgas paroligajn lecionojn en UK-oj.

## PREMIO GRABOWSKI AL DU INTERLINGVISTOJ

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beleto. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (*Ulrich Lins*, *István Ertl* kaj *Mine Yositaka*) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al *Ilona Koutny* kaj *Andreas Künzli*.

*Ilona Koutny*, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznań. Spirita heredantino de prof. *István Szerdahelyi*, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperantofakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris intermacie.

*Andy Künzli*, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio "Universalaj lingvoj en Svislando", kiu donas panoraman bildon pri 100-jara historio de la movado ne nur Esperanta, sed ĝenerale planlingva, en Svislando. La riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco.

## SUBVENCIO CIGNO FAVORE AL SRILANKO

Subvencio Cigno estas donata ĉiujare por subteni agadon, kiu celas disvastigi Esperanton en evoluantaj landoj de la Tria Mondo. Ĝia valoro estas 500 000 japanaj enoj, t.e. proksimume 2950 eŭroj. La subvencion financas la japana mecenato *Miyoshi Etsuo* kaj pri ĝia celo decidas ĉiujare la Estraro de UEA.

Ĉi-jare Subvencio Cigno estis asignita al la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por ĝia projekto Agado Srilanko. La projekto temas pri presado de la jam preta vortaro sinhala-Esperanto-sinhala, kaj sendado al Srilanko de esperantisto el Barato aŭ Nepalo por gvidi konversacian kurson al la lokaj esperantistoj, kiuj ĝis nun estas izolitaj de la ĝenerala movado, kaj por rektametoda kurso al neesperantistoj.

### Kongresa rezolucio

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon “Lingvoj: trezoro de la homaro”,

**Festante** ĉi-jare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio,

**Notante** la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

**Rimarkante** la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimultoj, kaj

**Atentigante** pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj,

**Varme bonvenigas** la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la kongreso,

**Reemfazas** la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

**Alvokas** la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj, kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

**Invitas** al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,

**Instigas** ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj

**Proponas** al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.



## BELARTAJ KONKURSOJ

### POEZIO:

**Unua premio:** Mikaelo Giŝpling (Israelo) pro "Rekviemo";

**Dua premio:** Gerrit Berveling (Nederlando) pro "Mortis la Dioj";

**Tria premio:** Jean-Marie Ries (Luksemburgio) pro "Tiu vino" kaj "Lastaj pensoj de mortanta poeto".

Partoprenis 21 aŭtoroj el 16 landoj.

### PROZO:

**Unua premio:** Lena Karpunina (Rusio) pro "Ordinara vizaĝo";

**Dua premio:** Sten Johansson (Svedio) pro "Kemio";

**Tria premio:** Lena Karpunina (Rusio) pro "Novaj tempoj".

Partoprenis 24 aŭtoroj el 15 landoj.

### ESEO:

**Unua premio:** ne aljuĝita;

**Dua premio:** Luiza Carol (Israelo) pro "Esperantismo kaj vegetarismo: similaj trajtoj";

**Tria premio:** ne aljuĝita;

**Honora mencio:** Pieter Doumen (Belgio) pro "Lingvo: trezoro de la popolo".

Partoprenis 5 aŭtoroj el 4 landoj.

### TEATRAĴOJ:

**Unua premio:** ne aljuĝita;

**Dua premio:** Geraldo Mattos (Brazilo) pro "Amo ne murdas";

**Tria premio:** ne aljuĝita.

Partoprenis 6 aŭtoroj el 6 landoj.


FILMO: neniuj valida konkursaĵoj.

## OSIEK-premion en 2008 ricevis Sergej Pokrovskij

Siberia esperantisto Sergio Pokrovskij, membro de la Akademio de Esperanto, estas laŭreato de la OSIEK-premio 2008. Oni atribuis al li ĉi tiun prestiĝan premion la 18-an de julio 2008 per sekreta voĉdonado en la Internacia Esperanto-Konferenco en Ŝempeter pri Gorici (Slovenio) pro la "Komputika Leksikono" (Sezonoj, 1995).

## S poutnickou holí Kun pilgrimbastono

Nova poezia libro de Ĉestmír Vidman spegule kun Esperanto-traduko de Jaroslav Krolupper kaj ilustraĵo de Jaroslav Krpejš aperis somere 2008.





## La konferenco de ILEI en Portonovo, Benino.

Finfine okazis la konferenco de ILEI en Afriko, en Benino, en la urbo Portonovo. Partoprenis konferencanoj el jenaj landoj: Nederlando, Francujo, Japanujo, Ĉeĥujo (V. Chvátalová), Britujo, Aŭstralio, Litovujo, Italujo, Togolando, Benino, Eburua Bordo, Burundo, Ganao. Entute 42 partoprenantoj ĝuis tiun konferencon.

La 30-an de julio 2008 malfermiĝis la konferenco per la hiso de la verda flago. Estis varme kantita la himno *La Espero* ĉeeste de la reprezentanto de la urbestro. Solene estis prezentitaj la oficialaj salutmesaĝoj de UEA fare de Hori Yasuo, de ILEI fare de Isikawa Tiekio, kaj la salutmesaĝo de LKK fare de Charles Alofa, de la Afrika oficejo de UEA fare de Francis Agbenou. Tuj poste okazis la akcepto de la esperantista delegitaro ĉe la urbestro por komune manĝi tutamikece.

Venis la momento prelegi pri homaj rajtoj, sub la gvido de Renée Triolle, kaj poste de prelego pri vitaminplantoj sub la gvido de Jean-Pierre Boulet, Lingva festivalo sub la gvido de Vlad'ka Chvátalová, Lingva ludo sub la gvido de Ana Montesinos, prezentado de projekto "Mondorondo" de Latifou kaj la ekzamenoj sub la gvido de Mireille Grosjean.

La konferenco tre bele buntiĝis per multaj aktivecoj rilate al lingvo-kono, okazo renkonti nekonatajn amikojn,

kultura festivalo, kiam rava koncerto estis prezentita de Mayuko Tazima kaj de Hori Yasuo, kiuj dancigis ĉiujn konferencanojn je la sono de japana gitaro. La tuta ĉambro entuziasmiĝis kaj aŭdeblis ĉie kantkrioj kaj dancpaŝoj.

Okazis ĉefe multaj diskutoj pri la plibonigo de la situacio de Esperanto en Afriko.

Ĉiuj konferencanoj multe ĝojas pro tiu bela evento, kiu ebligis al ili pli ekkoni la evoluon de Esperanto en Afriko kaj en unuopaj landoj de Afriko.

La 5-an de aŭgusto 2008 okazis la solena fermo per oficiala voĉo de Aida Ĉiĝikaité reprezentanto de ILEI en la konferenco.

La Afrika Oficejo dankas al UEA, ILEI kaj al ĉiuj, kiuj materie kaj finance helpis al ĉi-tiu konferenco. Estis omaĝo al Esperanto, omaĝo al Afriko, omaĝo al ILEI kaj al UEA. Soifas ĉiuj regustumi tiajn eventojn en Afriko.

*Kodjovi Francis AGBENOU  
Oficisto en la Afrika oficejo de UEA*

## IJK 2008

La Internacia Junulara Kongreso okazis ĉijare en la hungara urbo Szombathely inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2008. La kongresa temo estis *Minoritataj rajtoj - individuaj kaj kolektivaj*. Partoprenis 365 homoj el 36 landoj (9 ĉeĥoj).

## Bona Volo

Legio de Bona Volo (LBV) estas brazila organizo de la terciara sektoro, kiu plenumas sociedukan laboron favore al la tuteca elvolviĝo de la Homa Estulo kaj ties Eterna Spirito. Ĝia agado disvolviĝas en pluraj landoj kaj estas rekonata internacie de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

La Institucio, kiu ekde sia fondiĝo (en 1950) disvastigas la internacian idiomon, potencan ilo por la interfratiĝo de la popoloj, aperigis la jenan publikaĵon: revuo *BONA VOLO*, n-ro 63, kiu reliefige informas pri agadoj de la Institucio ĉe Esperantujo.

En ĉi tiu numero vi ankaŭ povos legi la ĉefartikolon de la Direktoro-Prezidanto de LBV, la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto: "Ezopo, Libero kaj Espero", kiu prezentas al la konsciencoj la meditado pri la vera libero, kiun ni tre sopiras atingi, ne forgesante ĝian bazan principon: la senton pri respondeco.

Ni petas vin bonvole esprimi vian opinion pri la agado de Legio de Bona Volo.

### ALIRU AL NIA RETEJO

<http://www.boavontade.com>

### KAJ REVUO

[http://www.boavontade.com/bona\\_volo\\_63.pdf](http://www.boavontade.com/bona_volo_63.pdf)

*Maria Aparecida da Silva  
Respondeculino de la Departemento pri  
Esperanto de Legio de Bona Volo*

## Centro de Konstanta Edukado

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Pollando, en aŭgusto 2008 estis registrita ĉe Prezidento de la Urbo Bydgoszcz kiel Centro de Konstanta Edukado sub n-ro 13/08 laŭ sugestoj de edukaj instancoj en Bydgoszcz. Estis plilarĝigita statuto de la Studumo de 36 al 60 paragrafoj, kiuj pli detale difinas diversajn formojn de edukado, kiun nun pli larĝe eblas realigi. Estis pli detale rekonita kunlaboro kun Akademio Internacia de la Sciencoj – AIS. Nun diverslandaj studentoj povos ne nur bakalauriĝi, sed ankaŭ magistriĝi ĉe AIS studante dum kvin jaroj en ISTK – AKB – AIS Klerigejo Bydgoszcz – la **unua klerigejo en la mondo kun ĉiutaga instruado en Esperanto**. Estis statute konfirmita ankaŭ kunlaboro kun Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz, Ekonomia Altlernejo en Bydgoszcz kaj pliaj altlernejoj, institucioj kaj organizaĵoj. Interesa eduka novaĵo estos Internaciaj Kursoj pri Diplomatio en Bydgoszcz kunlabore kun Muzeo pri Diplomatio.

Pliaj informoj:

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo – Centro de Konstanta Edukado  
str. M. Skłodowskiej – Curie 10 PL 85-094 BYDGOSZCZ, POLLANDO tel. 48-52/346 11 51

Rete: [stud-esperanto@wp.pl](mailto:stud-esperanto@wp.pl) aŭ  
[andreo@rubikon.net.pl](mailto:andreo@rubikon.net.pl)

## Lančov 50-foje

La ĉijara tendaro okazis jam la 50-an fojon sur la sama loko, ĉe la golfo de Lančov. Sume ĝi estis jam la 56-a tendaro organizata de EK Třebíč, ĉar la 6 unuaj estis aliloke ĉe la sama lago Vranov.

La jubileon festis la 9-an de aŭgusto 2008 kvindeko da ekstendaranoj, kiuj rememoris pri sia junaĝo en la tendaro. Esperanto-kurso okazis ĉijare en la unua etapo.

## E-lingvo

La nova societo E-lingvo jam pri-laboris sian retejon Esperante kaj ĉeĉe ĉe: <http://www.elingvo.eu>. Preparataj estas versioj angla, hispana kaj alilingvaj laŭ helpemo de alilandaj esperantistoj. La retejo celas konvinki la publikon pri la neceso de komuna lingvo en EU, se ni ne volas timi vojaĝi tra Eŭropo kaj komuniki nur per „gesta lingvo“. Preparata estas ankaŭ koncerna broŝuro.



## Ekfunkciis retejo

### de la 94-a UK Bjalistoko

La retejo havas adreson:  
<http://94uk.bialystok.pl>



En la retejo oni trovas informojn pri la urbo kaj ankaŭ la 0-an bultenon en PDF-formato. La lokaj radioamatoroj eĉ preparis konkurson por radioamatoroj el la tuta mondo en pluraj lingvoj.

## Nova "Esperanto-TV" en interreto!

La portalo "Esperanto-TV" (<http://esperanto-tv.com>) mem ne produktas novajn filmojn, sed disponigas 9-kanalan programliston, enhavanta multajn interesajn filmojn, troveblajn dise en pli aŭ malpli kaŝitaj anguloj de interreto.

*laŭ RET-INFO*

## EKOTUR, regulaj ekoturismaj renkontiĝoj

La unua klubo de turistoj estis fondita en Londono, sed ankaŭ Klubo de ĉeĥaj turistoj (KČT) fondita en 1888 apartenas al tiuj kun la plej longa historio en la mondo.



Tiutempe la termino „turismo“ signifis turismon perpiedan, ekkonon de naturo, kulturaj tradicioj, ktp. Tamen, kun la evoluo de la tekniko kaj ekonomiko la signifo de la vorto turismo ŝoviĝis kaj precipe ĝeneraliĝis, do nun per ĝi ni komprenas ĉiun eblan agadon kun la celo suĉi monon de homoj vojaĝantaj, ja eĉ malkaŝe oni parolas pri kontribuo de turisma industrio al ŝtataj buĝetoj. Tial komence de la nuna jarcento oni internacie enkondukis novan terminon „ekoturismo“ kaj tuj la ĝenerala asembleo de UNO deklaris la jaron 2002 „Jaro de ekoturismo“.

Kaj samjare, omaĝe al tiu deklarita Jaro de ekoturismo, mi organizis la unuan ekoturisman renkontiĝon en la montaro Ŝumava (biosfera rezervejo, kiu en la jaro 1999/2000 estis deklarita „Pejzaĝo de la jaro“). Jam antaŭe mi organizis turismajn renkontiĝojn por biciklantoj „IBIRE“, kiujn mi ne nuligis, sed ili iĝis parto de Ekotur. Do nun Ekotur estas jam tradicia ĉiujara renkontiĝo de biciklantoj kaj piedturistoj,

kiuj ŝatas kaj volas pli proksime ĝui naturon ne postlasante ajnajn damaĝojn en ĝi.



Pasintjare Ekotur okazis en Radošov kaj ni esploris la regionon de Karlovy Vary inkluzive de la montaro Krušné hory, ĉijare en Karlštejn, do nia intereso estis la montetaro Brdy kaj la Bohemia Karsto. Kutime estas internacia partoprenantaro, ekzemple ĉijare en Karlštejn kunmigris partoprenantoj el Ĉeĥio, Germanio kaj Bulgario. Unu aliĝinta franco, kiu ne povis veni pro vundiĝo, ne deziras resendi la monon, sed volas konservi ĝin por la venonta jaro, kiam li jam certe volas veni. Per tio li fariĝis la unua partoprenanto de Ekotur 2009, kiu okazos denove la lastan semajnon de aŭgusto, verŝajne en la limregiono Bohemio/Moravio (Litomyšl, Polička, Svitavy) aŭ en la plej okcidenta angulo de Bohemio (Aš).



*Teksto kaj fotoj: Petro Chrdle*

## 20-a Internacia Kultura Festivalo

28.-30.11.2008

### Programo

#### Vendredo:

interkona vespero en la restoracio „Na Rychtě“

#### Sabato:

*matene:* diskuta kaj prelega matineo en la lernejo „Eva Randová“

*posttagmeze:* homaranisma spirita koncerto en „ruĝa preĝejo“

*vespere:* bunta kultura vespero - muzikaj, kantaj kaj deklamaj programeroj kun tradicia tombolo

#### Dimanĉe:

Ekskurso al la urbo Děčín aŭ Naturamika turisma ekskurso

#### Tranoktado

Hotelo Palace

Ekopros

Polica tranoktejo

Prezoi inter 220 ĝis 430 Kč por persono kaj nokto.

Aliĝilon kun pliaj detaloj petu ĉe:

**S-ro Miroslav Smyčka**

**Dlouhá 20**

**CZ-370 11 České Budějovice**

M.Smycka@seznam.cz

**Aliĝu ĝis la 30-a de oktobro 2008!**

## Pozvánka na oslavy 100 let založení esperantského klubu v Prostějově

"V sobotu 7. února 2009 členové Esperanto klubo Prostějov oslaví 100 let od založení klubu, který byl založen 7. února 1909 v základní škole na Palacké ulici v Prostějově. Při této příležitosti bude v tento den dopoledne uskutečněno slavnostní odhalení pamětní desky na základní škole. Bude následovat prohlídka města a odpoledne se uskuteční prohlídka esperantské výstavy, která bude po dobu měsíce února umístěná v kině METRO. Večer bude kulturní program s tancem a tombolou.

Zájemci se mohou přihlásit do 31.12.2008 na adrese:

Esperanto klubo Prostějov,  
Křížkovského 12, 796 01 Prostějov.

Všem přihlášeným se rozešlou podrobné informace o akci s časovým harmonogramem. Je možné zajistit nocleh na ubytovně průmyslové školy. Zájemci o nocleh necht' požadavek uvedou."

## EK Prostějov jubileas

Sabate la 7-an de februaro 2009 la Esperanto-klubo en Prostějov festos sian 100-jariĝon en la lernejo Palacký, kie estos devualigita memortabulo. Post trarigardo de la urbo oni vizitos ekspozicion pri Esperanto en la kinejo Metro.



## KELI-kongreso en Pribylina, Slovakio



Entute 46 partoprenantoj el 12 landoj kunestadis en KELI-kongreso en Pribylina, Slovakio, je la monatsanĝo julio-aŭgusto. Dum la semajno oni havis la eblecon partopreni en diversaj program-punktoj ekzemple naturaj ekskursoj, komuna kantado, diverstemaj prelegoj, diservoj, muzika vespero, korpaj ekzercoj ktp. Inter la prelegantoj oni povas mencii Stano Marček, la redaktoron de la revuo Esperanto kaj aŭtoron

de la konata lernolibro „Esperanto per rekta metodo”, kiu jam estas tradukita en pli ol 20 lingvojn. Muzikistoj el Slovakio, gvidataj de Petr Sarnovsky, kiuj ofte koncertas okaze de diversaj Erenkontiĝoj ĝuigis la aŭskultantojn dum unu vespero. La nombro de partoprenantoj ebligis al ĉiuj ekkoni kaj paroli kun ĉiuj, kreante familian etoson.

*Bengt O. Åradsson*



*fotoj de la aŭtoro kaj Václav Pospíšil*

*Rim. de red.: La kongreson aranĝis KELI-sekcio de ĈEA*



## 100 000 artikoloj

En junio 2008 la esperantlingva versio de la interreta enciklopedio Vikipedio atingis nombron de 100 mil artikoloj. Ĉiutage aperas proksimume 40 novaj artikoloj pri diversaj temoj kaj multaj artikoloj estas kompletigataj kaj plibonigataj.

Parto de la artikoloj temas pri Esperanto-kulturo kaj aktualigas tiamaniere Enciklopedion de Esperanto el la jaro 1935. Alia grava temo estas priskribo de unuopaj ŝtatoj, iliaj urboj, monumentoj, artistoj, sciencistoj, sportistoj kaj aliaj gravuloj.

Trie estas en la enciklopedio priskribataj ĝeneralaj temoj kiel en aliaj enciklopedioj. Ĉiu artikolo enhavas ligan al samtema artikolo en alilingvaj versioj kaj en ili estas ligo el versio esperantlingva. Tiel ĉiuj uzantoj de Vikipedio scias pri Esperanto.

## Germana sekcio de EDE

La germana sekcio de la poresperanta partio EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) estis sukcese refondita sabate la 5-an de julio 2008. En la pasintaj eŭropaj elektoj en 2004 EDE pro tempomanko ne sukcesis kolekti la 4.000 subskribojn, kiuj estas bezonataj por partopreni la elektojn. Ĉi-foje por la kolektado de subskriboj restas multe da tempo. Inter la kandidatoj por la eŭropaj balotoj 2009 estas ankaŭ famaj esperantistoj Reinhard Selten kaj Ulrich Matthias. *laŭ EDE-komunikoj*

## Zamenhof-strato en Prago

Pragaj esperantistoj atingis gravan sukceson - la 5-an de aŭgusto 2008 la praga magistrato anoncis nomojn de novaj stratoj en la ĉeĥa ĉefurbo. Inter 13 novaj nomoj estas ankaŭ strato Zamenhof. Klarigo diras, ke la strato eliras orienten el la strato Průmyslová kontraŭ la strato U Stavoservisu kaj finiĝas ĉe la enirejo al komerca objekto. Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), pola kuracisto de juda deveno, poligloto kaj kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

## 61a IFEF-Kongreso

Triesto, Italio 23-29 majo 2009

Triesto atendas Vin! Maro, montoj, milda temperaturo kaj granda festado okaze de la 100-jariĝo de Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio: ĉio ĉi je via dispono! Fakaj (kaj ne-fakaj) prelegoj, konatiĝo kun loka kulturo, ekskursoj provinco kaj regione en eksterordinara Esperanta etoso: bonvenon al ĉiuj esperantistoj-fervojistoj kaj saman elkoran bonvenon ankaŭ al ĉiuj NE-fervojistaj esperantistoj! Pliaj informoj haveblas ĉe [www.ifeff.net](http://www.ifeff.net) kaj Triesta Esperanto-Asocio: [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it) kaj [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com) Poŝta adreso: Triesta Esperanto-Asocio - CP 601 Trieste Centro - IT-34132 Trieste - Italio.



## INFANOJ EL ĈEĤIO DENOVE EN POLLANDO

Vendredo 13.6.2008

Vendrede tagmeze kunvenis ok infanoj el E-grupo ĉe E-rondeto AMIKECO el Česká Třebová, ilia instruistino Zdenka Novotná kaj ankaŭ helpantino Klárka en stacidomo. Ili tre antaŭĝojis renkontiĝi kun la pola E-grupeto VERDA ARBETO en Rybnik. La vojaĝo ne estis tro agrabla, la trajno estis tro plena. Sed je la 17-a horo ni jam estis en Rybnik, kaj tie atendis nin geamikoj bonvenigante nin. Kunlaboro inter pola instruistino Teresa Konsek kaj gvidantino de la ĉeĥa grupeto Zdenka Novotná daŭras jam 5 jarojn.

Teresa preparis belan programon.

Sabato 14.6.2008



Sabate matene ni kun ŝi kaj la polaj E-infanoj veturis en la urbon Ustroń sub monto Czantoryja. Czantoryja estas tre konata de Esperantistoj. Unufoje en jaro kunvenadas sur ĝia pinto Esperantistoj el Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio.



Ni iris al bestoĝardeno en arbaro sur ĝia deklivo. Ĉe la enirejo eblas aĉeti manĝaĵon por bestoj. Ili estas tre malsovaĝaj, voras el la manoj de la infanoj, kuras al la infanoj. Unu cervo estis malkontenta kun plenumo de la nutraĵo, ŝtelis de unu nia knabino tutan saketon kaj forkuris.

Je la 11-a horo komenciĝas nutrado de rabobirdoj sur granda herbejo en arbaro. Du birdflegistoj rakontas pri la rabobirdoj kaj sinsekve nutras akcipitron, falkon, vulturon, neĝostrigon, aglon. Tiuj kaptas ĵetitajn viandopecojn flugante aŭ manĝegas sidante sur ganto-kovrita mano de la flegisto.

De la herbejo kondukas interesa fabela vojeto por la infanoj. Vi povas puŝi butonon de unu el 14 “vitroŝrankoj”. Tuj ekestas interne lumo kaj moviĝas figuroj el fabelo Ruĝa Ĉapeto, Neĝulino kaj sep nanoj, Kato piedvestita per botoj, Křemílek kaj Vochomůrka kaj el aliaj. La fabela vojeto finiĝas ĉe granda ludejo kun balanciloj, dekliva rondo, ŝnurego, saltbenko, trarampejo. Vi vidas, ke la infanoj trovis tre belan, interesan lokon. Ili ne volis foriri, sed je la 14-a horo nin atendis tagmanĝo en restoracio. Post ĝi surprizis ĉiujn eĉ Teresa-n sinjorino el vojaĝa oficejo, kiu veturis kun ni en buso. Ŝi regalis ĉiujn per senpaga vojaĝo en kablotramo supren sur pinton de Cyantoryja kaj reen.

La infanoj estis entuziasmigitaj, sed por mi estis terura afero pendi sur ŝanceliĝanta seĝeto super altaj arboj. Post ludoj kaj ripozo sur la monto ni trarigardis eĉ la urbon Ustroń, kie estis folkloro festivalo. Ni admiris sileziajn dancojn. Refreŝiĝitaj per glaciaĵo ni reveturis en Rybnik.

Dimanĉo 15.6.2008

Dimanĉe antaŭtagmeze la ĉeĥaj infanoj restis en polaj familioj kaj vizitis kun ili preĝejon. Posttagmeze ni kun pola grupeto promenis tra Rybnik. Teresa montris al ni la

urbon el la tegmento de nova vendejdomo. Iomete ni spertis pluvon. La pluvo fiaskigis planitan tendarfajron.



Lundo 16.6.2008

Ni iris en la lernejon, kie instruas Teresa. Ŝi montris al ni ĝian silezian muzeon, la natursciencan klason kun bestoj kaj fiŝoj, la gimnastikejon, kie ni kunvenis kun polaj E-infanoj. Ili montris al ni, kion ili scipovas en Esperanto. Ni aŭdis belajn E-kantojn. Ankaŭ la infanoj el Česká Třebová kantis, rakontis kaj ludis fabelon Esperante. Ambaŭ grupoj konkursis en Esperanto.

La tempo tro rapide forkuris. Posttagmeze ni disadiaŭis kaj forveturis hejmen.

En sekvonta jaro ni kunvenos kun polaj geamikoj en Česká Třebová.. Nur ni timas, ke nia programo ne estos tiel interesa.

*Zdenka Novotná*

## Esperantistoj vizitis la akvopreparejon de Česká Třebová

Sabate la 7-an de junio 2008 la klubo „Amikeco“ el Česká Třebová aranĝis someran balon kun danco kaj trarigardo de la parko Javorka kun akvopreparejo. Kolektiĝo de la partoprenantoj kaj ankaŭ plua programo estis en Lidový dům (Popola domo).



Proksimume 40 partoprenantoj traris la parkon Javorka, kie troviĝas interalie bela lageto kun nikso, monumento omaĝe al Johano Huso kaj ĉefe Esperanto-arbo. Antaŭ

jaroj esperantistoj unue plantis en la parko tuliparbojn (tulipa liriĉo, liliovník tulipánokvěty), sed ĉar la arbo estis detruiĝinta, ili decidis planti tilion. La Esperanto-arbo jam bele elkreskis. Ni haltis ĉe la statuo de Šárka, rigardis la 1-an fonton de trinkakvo, provizantan la urbon.

Poste sekvis vizito de komplekso de akvoprepara societo de Orlice, kie nin atendis s-ro Marek Novotný. Detale li priskribis funkciadon de la societo, kiu liveras trinkakvon al la tuta urbo Česká Třebová kaj prizorgas ankaŭ purigejon de poluakvoj. La tuta sistemo estas monitorata per komputiloj. Li montris al ni artezan puton, el kiu la akvo ŝprucas el la subterejo kaj enfluas en rezervujojn.

Poste ni eniris transĉerpan stacion, kie li montris al ni, kiel aspektas tubaro kuŝinta multajn jarojn en la tero. Por distribui la akvon oni uzis iam tubojn el asbesta cemento, poste el giso kaj nun el plasto. Ni povis vidi, ke la mineraloj sedimentiĝas sur la interna flanko de la tuboj, ke la vagaj fluoj detruas la gisan tubaron kaj la akvo eskapas en la teron. Nun oni ŝparas la akvon per malebligado de ĝia eskapado, kaj la konsumado de trinkakvo malkreskis ankaŭ pro altiĝo de ĝia prezo. Fine ni vizitis novan ejon kun subteraj rezervujoj de trinkakvo, kiu sufiĉas por la tuta urbo dum 24 horoj.

En la Popola domo la infanoj de instruistino Zdenka Novotná ludis por ni fabelajn scenojn, kantis kantojn kaj prezentis enigmojn. Hedvika Švendová el Brandýs nad Orlicí, kiu ĉijare venkis en la tutrespublika konkurso de gitar-ludado, muzikis por ni kun sia pli juna fratineto Dominika per gitaro, violono kaj fluto. La spektaklo de la infanoj estis bunta kaj tre plaĉis al ni. Sekvis raportoj el la kluboj. La klubo el Svitavy invitis ĉiujn al solena inaŭguro de Esperanto-muzeo la 20-an de septembro. La dua duono de la renkontiĝo apartenis ĝis la noktaj horoj al dancado kaj aŭskultado de muzikgrupo de s-ro Borýsek

*Libuše Dvořáková*

### **Kristnasko bilde kaj poezie**

Geknaboj 6-14-jaraj estas invitataj sendi ĝis la 10-a de novembro 2008 siajn verkojn al adreso:

**Esperanto Trieste - C.P. 601 Trieste Centro, IT-34132 Trieste - Italia**

Oni rajtas kontribui per

- 1) desegnaĵo, maksimume formato A4
- 2) poeziaĵo

La desegnaĵo havu frazon en Esperanto kaj la gepatra lingvo de la aŭtoro, ankaŭ la poeziaĵo estu en Esperanto kaj la gepatra lingvo.

Bonvolu skribi la nomon, aĝon, lernejon kaj klason, adreson, se eble ankaŭ aldonu foton de la aŭtoro. Estas tri kategorioj (6-8, 9-11, 12-14 jaroj).

## **Honorigo el Ĉinio**



S-ano Josef Kříž denove gajnis premion de Ĉina Radio Internacia pro siaj scioj pri la ĉinaj historio kaj kulturo. Li ricevis tablotukon kaj diplomon.



## TRADICIA KAEST NETRADICIE

Konferencoj *Aplikoj de Scienco kaj Tekniko* (KAEST) havas longan tradicion. Ĝin komencigis en 1978 serio de seminarioj *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko* (SAEST), kiun organizadis ĉiujare alterne Scienc-teknika sekcio de ĈEA kaj SEA (Slovakia Esperanto-Asocio). Ĉiam rolis sekcio kun konkreta ĉeftemo kaj krome sekcioj terminologia kaj ĝeneral-scienca. La lasta SAEST, dediĉita al la ĉeftemo „Trafiko“ okazis en Strážnice en 1989. Ĉiam estis eldonita prelegkolekto kaj pluraj el ili estas ankoraŭ aĉeteblaj en la libroservo de ĈEA.



En la naŭdekaj jaroj mi strebis revivigi la tradicion, nepre inkluzive la eldonon de la prelegkolektoj en la papera formo, kio minacis alporti malprofiton, kiun ĈEA ne povis riski. Krome, malgraŭ mia peno mi ne sukcesis levi intereson en Slovakio. Tial mi decidiĝis transpreni la taskon per mia tiam kontentige evoluiganta agentejo KAVA-PECH. Ĉar ne estis en miaj fortoj ĉiujare, ekde 1998 jam denove estas daŭrigata la tradicion, tamen nur en Ĉeĥio kaj nur ĉiun paran jaron. La principo de tri sekcioj, el kiuj ĉiam unu dediĉita al ĉeftemo, restis konservita, la preleg-kolektoj estas de tiam

en belaspekta formo kaj ili enhavas krom la kontribuoj en Esperanto ankaŭ resumojn en la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj, por ke ili estu uzeblaj ankaŭ reklamcele ĉe fakuloj neesperantistoj.

Dum la Ĉeĥa-Slovaka tradicion de SAEST-oj estis interrompita, ekestis nova tradicion de SAEST-oj: nian nomon transprenis regulaj Seminarioj *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko* organizataj en Kubo. Ĉar ni ne volis, ke estu konfuziĝo, ĉu temas pri SAEST en Kubo aŭ en Ĉeĥio, ni ŝanĝis la nomon kaj ekde 1998 ne plu estas SAEST-oj, sed KAEST-oj (unue Kolokvoj, sekve Konferencoj, sed sub la sama mallongigo).

La plej proksima KAEST okazos en Dobřichovice inter la 7-a kaj 9-a de novembro ĉi-jare. Netradicie ĝi ne havos ĉeftemon. La kialo estas, ke dum la lastaj KAEST-oj la nombro de la prelegoj en „flankaj“ sekcioj superis tiun ĉefteman.

Sed estas ankoraŭ aliaj novaĵoj ĉi-jare: Enkadre de KAEST estos dediĉita la tuta sabata posttagmezo al seminario „Problemario de fakaj artikoloj en esperantlingva Vikipedio“, kiun iniciatis kaj gvidos Pavla Dvořáková. 18 komputiloj en komputilejo kun daŭra konekto al la interreto estas por tiu celo afable disponigitaj de la loka lernejo. Kaj krom Pavla estos je dispono pluraj spertaj vikipediistoj (L. Szilvási, M. Malovec, tre verŝajne ankaŭ la aŭtoro de la „Manlibro pri Vikipedio“ Yves Nevelsteen), do espereble ĉiuj havos okazon vere praktikiĝi, kiel efike kontribui al la plej fama malferma reta enciklopedio, en kiu Esperanto estas unu el 20 lingvoj enhavantaj plej grandan nombron de difinoj.



Krome, mi povas jam anonci, ke nun jam ankaŭ en Slovakio ektraviĝis organizanto preta daŭrigi la tradicion de AESToj, nome Petro Baláž. La venonta KAEST do okazos en Slovakio. Nur dum la novembra KAEST ni interkonsentos pri la venonta daŭrigo, ĉu ni revenu al ĉiujara alternado en Ĉeĥio kaj Slovakio, ĉu post 10 jaroj en Ĉeĥio nun por pli longa tempo en Slovakio, ĉu ...



La programo de KAEST 2008 jam estas kompleta, do ne plu eblas anonci novan prelegon, sed jes certe valoras aliĝi kaj ĝui interesajn prelegojn, diskuti, praktikiĝi pri Vikipedio. La kompleta programo de KAEST estas alirebla ĉe [www.kava-pech.cz/kaest](http://www.kava-pech.cz/kaest), sed mi diru

almenaŭ, ke okazos 18 prelegoj de aŭtoroj el 7 landoj (BG, CZ, DE, DK, HU, IT, RU) kaj mi nomu almenaŭ kelkajn temojn, kiuj pleje kaptis mian atenton: W. Blanke (DE): „Knedliko, ĉu terminologie bongustas?“, J. Nieman (DK): „De kie venas trankvila intervivo?“ aŭ K. Votoček (CZ): „La plej precizaj geodeziaj laboroj“. Sed mi ne dubas, ke ĉiu trovos ion interesan por si dum la konferenco.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe [www.kava-pech.cz/kaest](http://www.kava-pech.cz/kaest) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).

*Teksto kaj fotoj Petro Chrdle*

## Preparoj de la nova muzeo

En la muzeo realiĝis pluraj laborbrigadoj - jen du bildoj el ili.



## Mgr. Zdeněk Hršel (1928)

*Post junaĝo en Hradec Králové li edziĝis, kaj en 1965 la familio transloĝiĝis al Brno. Filologo laŭ kleriĝo, bibliotekisto laŭ profesio, li ĉiam interesiĝis profunde pri Esperanto kaj ĝia literaturo. Kiel iama gimnazia lernanto de Miloš Lukáš li kompilas bibliografion de ties verkoj. Li iniciatis kompiladon de la novaj vortaroj Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta, kvankam pri la lasta redakto li rezignis, ne havante komputilon. Multajn jarojn li estis sekretario kaj nun prezidanto de EK Brno. Li esperantigis prospekton pri Brno.*



*Vi estas filo de muzikisto-esperantisto, do ankaŭ vi nature fariĝis esperantisto?*

La vojo al mia esperantisteco ne estis simpla. Mia patro estis - jam antaŭ sia edziĝo - membro de UEA kaj de Esperantista klubo en Hradec Králové. Ekzistas foto de la membroj el la jaro 1926 kaj lia artikolo pri Bedřich Smetana en Literatura Mondo, kiun por publikigo tradukis D-ro Josef Fousek. Tamen li en familia rondo neniam menciis Esperanton, sole li parolis pri sia Egipta korespondanto Tadros Megalli.

Eble kiel sepjarulo mi trovis inter malnovaj paperaĵoj jarlibrojn de UEA kun artikoloj pri runaj alfabeto kaj hiero-

glifoj, tre interesaj por mi. Iom poste mi kun la frato Mirek trovis hejme praktikan lernolibron kun vortaretoj (Brno, 1930), el kiu mi skribe tradukis unu artikoleon. Sole la vorton „samideano“ mi ne deĉifris. Ĝi sonis al mi iom ru-  
mane.

Apenaŭ dekjarulo mi ricevis pere de paĉjo celofanstrian albumeton kun uzitaj eksterlandaj poŝtmarkoj donacitan de s-ro Pytloun, tiama gvida persono de la Esperantista klubo. Tiamaniere mi estis logota por Esperanto, facila komunikilo ankaŭ por filatelistoj. Tia maniero, kiun mi sentis kiel iaspecan subaĉeton, tute ne plaĉis al mi. La internacia lingvo kaptis min per sia logikeco kaj klareco, pri eblaj materiaj akiroj mi tute ne pensis.

Dum la someraj ferioj 1939 mi pasigis ĉ. du semajnojn ĉe mia onklo en Rohatec (Suda Moravio). Ekskursante al Hodonín kun kuzo Milan, mi vidis en librovendeja montrofenestro lernolibron de Esperanto. Tio instigis nin prizorgi al ni tiaĵon. La lernolibro de Kilian post ia tempo fariĝis por mi la unua sisteme uzata konatigilo pri Esperanto. La lingvon ni uzis ankaŭ ĉe posta reciproka korespondado.

En la biblioteko de mia patro mi trovis la lernolibron „Ellernu“ de Szilágyi, el kiu mi ĉerpis pliajn faktojn. Por t.n. „parola ekzerco“ en leciono de la germana mi preparis informon pri Esperanto, kiu tamen restis nur en skriba formo. (Feliĉe mia tiama naiveco estis saĝe haltigita de la juna profesoro Jan Ort, kiu antaŭ nelonge estis kiel studento ellasita el la koncentrejo Sachsenhausen post traktado de prezidento Hácha kun Hitler. Tion tamen mi eksciis nur post longa tempo).



Post la milito mi partoprenis en Ĉe-metoda kurso de s-ano Pytloun kaj kun samklasano de la kuzo, Mirek Hromas, regule vizitadis kunvenojn de la Klubo, kie mi akiris spertojn en societa vivo kaj kie ni por lingve perfektigi tradukadis ilustritajn spritaĵojn el Dikobraz. Tre utila estis regula alternado en gvidado de la kunvenoj. Tiam mi kaj la aliaj junuloj ĉiam ankoraŭ estis komencantoj. Kiam ni dum aŭtobusa ekskurso al Jaroměř aŭdis paroli Jaroslav Šustr (prez. de la Praga klubo), ni akiris lian rapidan kaj tamen bone kompreneblan paroladon, kies rapidecon ni komparis kun maŝin-paŝilo. Tiam ni komencis ankaŭ korespondi kun multaj samideanoj - de Argentino ĝis Bulgario, Nederlando k. m. a. Poŝtkartoj kaj leteroj flugis al preskaŭ ĉiuj kontinentoj.


Kiam alia grava persono de la Klubo, instruisto Josef Vítek, revenis el sia propaganda turneo al Skandinavio, li informis min, ke el Svedujo mi ricevos inviton por kelktempa vizito. Somere 1947 mi do pasigis du semajnojn en Karlskoga (Vermlando) ĉe la kluba prezidanto kaj lia edzino. La rezulto de la kelknacia esperantista medio estis la ĉefa faktoro, ke mi fariĝis aktiva parolanto. Mia eniro en la multifacetan vivon esperantistan efektiviĝis.

Kiam mi resumas la vojon al mia esperantisteco, mi devas konfesi, ke okazis pluraj puŝoj kaj iniciatoj, hazardaj kaj intencaj. Ĉu mi sufiĉe plenumis miajn eblojn, mi ne scias.

*Vi iniciatis novan vortaron*

Jes, la iniciativo venis de mi iam antaŭ la jaro 1987, kiam mi kredis, ke miaj slipoj kun trovitaj ekvivalentoj de ĉeĥaj

esprimoj sufiĉos kiel bazo por nova vortaro ĉeĥa-Esperanta. La kontrakto kun la eldonejo SPN (Ŝtata Pedagogia Eldonejo) estis subskribita novembre 1987, la manuskripto estis transdonota septembre 1989, post 22 monatoj. Por la parto Esperanta-ĉeĥa SPN akceptis samideanon Karel Kraft. La pretigo de la definitiva parto estis tre temporaba kaj montriĝis, ke mia tempo ne sufiĉas. Multaj kunlaborantoj helpis kolekti esprimojn sur slipoj, aliaj tajpis ilin laŭ normo por manuskriptoj. SPN unue redonis la tajpaĵon kun multaj leksikografiaj rimarkigoj por reverko, sed post 1991 ili anoncis, ke ili eldonas lernilojn sole por la angla lingvo kaj ke ni serĉu alian eldoniston. Krome la amplekso, planita de SPN, t.e. poŝvortaro kun limigita kvanto de la ĉeĥa vortprovizo ne estis tiom vasta, kiom (laŭ ni) meritis moderna vortaro. La kunlaborantoj enkomputiligis la vortaron kaj Karel Kraft transprenis la taskon de la definitiva redakto. Dank' al li la vortaro aperis ĉe KAVA-PECH en 1995 (e-ĉ) kaj 1998 (ĉ-e). La nun dekjara vortaro nepre sendube bezonas kompletigon kaj eĉ korektojn kaj unuecigon (ekz. ĉe esprimoj konsistantaj el adjektivo kaj substantivo), kaj tiu laboro transiris al kompetentuloj pli junaj.



## Inĝ. Vlastimil Kočvara (1936)

*Minmaŝina inĝeniero kaj fakinstruisto en teknika lernejo, post 1968 en fabriko. Li esperantistiĝis en 1948, post fondiĝo de ĈEA komitatano, ekde 1979 vicprezidanto kaj en 1993-1999 prezidanto de la asocio. 1987-2001 komitatano de UEA, partopreninto de 14 UK. Li prezidis LKK-on de la 81-a UK en Praha (1996). En la asocia komitato li multajn jarojn respondecis pri kulturo kaj eldon-agado. Li ĉeestis vicon da Esperanto-tendaroj kiel organizanto, instruisto, estro. Gvidis multajn E-kursojn, organizis esp. renkontiĝojn, ekde 1960 gvidanto de la loka movado en Opava.*



*Vi kaj via frato Drahomír (sur la foto dekstre) estis grandaj personecoj de Ĉeĥa Esperanto-movado dum pluraj jardekoj. Ĉu vi heredis Esperanton de viaj gepatroj aŭ kiel vi venis al ĝi?*

Nia esperantisteco estis pura hazardo – nenia scio pri tiu lingvo kaj movado en nia familio estis. Mia frato foje veturinte en lernejon – tiam ni loĝis en vilaĝo – trovis insignon kun verda steleto. Li portis ĝin nesciante, pri kio temis. En unu momento lin alparolis vera esperantisto – mi nun jam ne scias, kiu li estis. Post klarigo mia frato eksentis simpation al Esperanto kaj aliĝis en kur-

son en Ostrava. Por povi ekzerci en la lingvo li devigis min hejme lerni kun li kaj ni komencis verde balbuti. Tio ja okazas, ke plijunulo devas obei sian pli aĝan fraton, des pli, se tiu iam plenumas gepatran inspektion

*En 1996 vi estis prezidato de LKK dum la praga UK, kio certe postlasis ĉe vi multajn rememorojn. Ĉu vi povas diri al ni, kio plej forte impresis vin dum tiu laboro kaj je kio vi plej ĝoje rememoras?*

La Praga UK estas mia plej forta vivtravivaĵo kaj ne nur en Esperanto-vivo. Ne ĉiuj kredis, ke ĝi sukcesos, ja eĉ kelkaj esperantistaj funkciuloj dubis pri sukceso. Des pli ĉeĥaj organizaĵoj ne povis kredi, ke ni kapablos realigi tutmondan renkontiĝon sen profesiaj oficistoj, sen vasta ŝtata subteno. Ni ja sukcesis kaj mi eĉ kuraĝas diri brile, kvankam oni povus trovi diversajn malglatiĝojn, sed tiuj la finan rezulton ne povis dubigi. Kompreneble, miaj rememoroj estas daŭre vivaj en ĉiuj direktoj kaj ne eblas ilin koncizigi nur en kelkajn vortojn. Nur min malĝojegas, ke mi jam neniam plu travivos ion similan.



*UK 1996 - V. Kočvara transdonas la flagon al K. Enderby por UK Adelaide 1997*


*Ĉu vi havas iun specialan mesaĝon por nunaj junaj esperantistoj?*

Mi estas homo realisma kaj mi vidas, ke aktuale la movado stagnas. La pioniroj forlasis la mondon, merituloj rapide maljuniĝas kaj junuloj nur sporade aperas. Ne la unuan fojon en historio de la movado. Mi opinias, ke al junuloj mankas iom da romantiko, iom da laboremo – almenaŭ en senprofita agado.

Tamen – prenu instrukcion el nia movado: Post malapero de organiza movado en Ĉeĥoslovakio gvidis esperantistojn junuloj, kiuj lernis, instruis, eldonis, organizis. Kaj en tiu tempo oni ne povis vojaĝi, korespondado estis danĝera, eksterlandaj vizitantoj nur raraj. Tamen oni persistis. Esperanto ne estas nur lingvo, ĝi estas filozofio, unu el tiuj, kiuj egalrajtigas kaj samtempe unuigas homojn. Mi ja tiel komprenas la esperantismon, kiu min ege stigmatizis, iam eĉ malprofiteme. Malgraŭe mi ne perfidas ĝin.



*Dum multaj jaroj V. Kočvara redaktis literaturan almanakon de Starto Panoramo, kies unuopaj kaje-roj estis dediĉitaj al niaj eminentaj literaturistoj: Jiří Kořínek (1976), Miloš Lukáš (1977), Rudolf Hromada (1978), Oldřich Kníchal (1980), Eli Urbanová (1981), Valda Vinař (1981), Josef Vondroušek (1984).*



*Granda amo de Vlastimil Kočvara estas la poemo Majo de Karel Hynek Mácha - li kolektas ĉiujn akireblajn ĉeĥlingvajn eldonojn kaj li ankaŭ prizorgis, ke povu aperi la eminenta esperantlingva traduko de Tomáš Pumpr, kiu bedaŭrinde dum sia vivo la eldonon ne sukcesis efektiviĝi.*

## EmProf. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc. (1935)

universitata profesoro, dekano de Pedagogia fakultato, kunfondinto kaj iama rektoro de Nordbohemia universitato J.E.Purkyně (1995-2001).



*Li esperantiĝis en 1946, 1951 ekzameniĝis kiel instruisto de Esperanto. Movade aktivis unue en Opava, de la jaro 1953 en Ústí nad Labem. Instruis Esperanton en Opava, Žimrovice kaj Lančov, sed ankaŭ en la Pedagogia fakultato en Ústí. Jam kiel junulo li redaktis la porjunularan bultenon „Tagiĝo“, aŭtoris „Skizo pri la Esperanta Literaturo“ (Opava, 1956). Profesoro de AIS San Marino, rektoro de Internacia Kongresa Universito dum la UK en Prago 1996, tradukinto (kun sia edzino Věra) de „Taglibro de mia frato“ de Chava Pressburger (KAVA-PECH, 2007). Membro de UEA kaj ĝia delegito, prezidanto de la E-klubo en Ústí kaj kunorganizanto de ĉiujaraj popularaj Internaciaj Kulturaj Festivaloj.*



*Vi estas filo de elstara esperantisto Jaroslav Novobilský kaj edziĝis kun la filino de alia elstara esperantisto Jiří*

*Kořínek. Ĉu viaj patro kaj bopatro amikiĝis kaj vizitadis sin reciproke kaj tiel vi ekkonis vian estontan edzinon, aŭ estas nura hazarda koincido?*

„Mia patro, direktoro de elementa lernejo en Melč apud Opava, informis pere de Esperanto eksterlandon pri la krima agado de germanaj faŝistojn sur teritorio de t.n. Protektorato de Bohemio kaj Moravio, ekestinta post Munkena protokolo en 1938. Krome li laboris kiel unu el gvidaj personoj en rezista kontraŭ-faŝisma movado. Post perfido en 1941 li estis arestita far gestapo kaj la 7an de majo 1942 mortigita en la koncentrejo Mauthausen (Aŭstrio).


Mia patro kaj mia bopatro J. Kořínek ne konis unu la alian. Filinon de J. Kořínek, Věra Kořínková, mi ekkonis kiel mian lernantinon en la Esperanta somertendaro en Žimrovice. De tiam ni laboras por Esperanto kune.

*Mi scias, ke vi krom organizaj taskoj laboris kaj laboras ankaŭ sur aliaj E-kampoj. Ĉu vi povas malkaŝi al la legantoj de Starto pri kio temas?*

La literaturhistorian tekston „Skizo pri la Esperanta literaturo“ vi jam menciis. Mi kompilis ĝin kiel altlerneja studento de Karola Universitato en Praha (fako kemio, 1953-1958) kaj mi estis surprizita pro la pozitivaj en- kaj eksterlandaj recenzoj. Mi ankaŭ dediĉis longtempan atenton al verkoj de Jan Amos Komenský (Komenio), speciale rilate al liaj ideoj koncernantaj internacian lingvon. Krom tiutemaj publikigitaj artikoloj mi preparis ĉ. unuhoran sonbendan programon, en kiu rolis ankaŭ mia edzino kaj s-ano M. Smyčka. Ĝi estis pozitive akceptita ankaŭ eksterlande.



Por estonto mi preparis intervjuojn kun J. Kořínek (vd. Interreto) kaj Ota Ginz. Portreton de O. Ginz mi nun preparas por preso. Krom tio mi dum multaj jaroj kolektas faktojn pri la elstaraj figuroj de nia enlanda E-movado. Por naciaj monumentoj de milit-viktimoj en Lidice kaj Ležáky mi disponigis E-versiojn.



Specialan atenton mi dediĉas al la personeco de Francisco Valdomiro Lorenz, aŭtoro de la unua E-lernolibro por ĉeĥoj, kun kies filo Waldomiro L. mi estis en multjara kontakto. Mirige interesa vivo de FVL meritis ampleksan literaturan prilaboron.

*Mi petas pri kelkaj viaj vortoj je la fino de nia intervjuo.*

Mi konatiĝis kun Esperanto kiel 11-jara

knabo, kiel junulo mi entuziasmiĝis pri ĝi kaj kredis, ke ĝi baldaŭ tutmonde disvastiĝos. Sekvanta vivetapo, akompanita per enketado kaj minacado far la ŝtata sekreta polico pro mia E-agado, tamen montris al mi, ke tempo de ĝia eventuala ĝenerala akcepto estas ie en malproksima horizonto kaj pro tio ne povis ne veni eĉ skeptikaj pripensoj. La nuna stato de E-movado en nia lando estas bedaŭrinde trista: la movadanoj maljuniĝas, junaj adeptoj ĝenerale raras, la publiko pri Esperanto ne interesiĝas opiniante, ke ĝuste la angla lingvo estas solvo por la estonto. Tamen mi mem restos fidela al la movado kaj klopodos helpi - laŭ mia povo - al transponto de la nuntempa nefavora situacio al tiu pozitiva stato, kiam oni aprezos unikan rolon de Esperanto sur politika, kultura kaj ĉiutaga vivo kaj eluzos ĝin por bonstato de la homaro.



*Kun bondeziroj ni dankas al ĉiuj intervjuitoj. M. Malovec kaj P. Chrdle*

## Alexander Sommer-Batěk

1874-1944

Ĉi tiu esperantisto estas en nia movado konata kiel aŭtoro de la universala skribo *Neoglifoj* kaj de la libro *Instruo por gejunuloj pri la seksvivo*. Li tradukadis ankaŭ popolajn kantojn, instruis Esperanton al slovakaj ŝafpaŝtistoj kaj klopodis unuigi antaŭ la unua mondmilito niajn du organizojn Bohema Unio Esperantista kaj Bohema Asocio Esperantista (eseo *Rezultato de mia paciga entrepreno*, 1908).

Malpli konate estas, ke A. Sommer-Batěk ĝuste antaŭ cent jaroj reformis ĉeĥlingvan ĥemian terminaron de Bohuslav Brauner, kiu estas uzata ĝis nun. En la revuo *Chemické listy 102/2008* li estas nomata **da Vinĉi de ĉeĥa ĥemio**. Sed liaj publikaj aktivadoj estis multe pli vastaj.

Kun B. Brauner li precizigis la atompezon de cerio, klopodis krei aparaton por fluidigo de oksido kaj aparaton por mezuri aromojn. Verkis librojn pri historio de alĥemio, pri ĥemia teĥnologio, pri ĥemiaj eksperimentoj.

Li enkondukis en nia lando kultivadon de rabarbo, propagandis skoltismon, Savarmeon, Ligon de Arbara Saĝo, Kristanan Asocion de Junaj Viroj kaj teozofion. Verkis artikolojn pri radioaktiveco, rubaĵ-akvoj, medicino, prostituado kaj alkoholismo. Okupiĝis pri okultismo, spiritismo kaj batalis kontraŭ misuzo de atom-

energio. Li estis komitatano de Asocio de Abstinuloj, funkciulo de Societo de Vegetaranoj kaj fondis Ligon de Nefumantoj. Li estis pacifisto, Sokolano, liberpensulo, eldonisto de Ilustritaj Prelegoj, Intereso Tuthomaraj, Klopodoj Tuthomaraj, propagandis maĉadon, ĝustan spiradon kaj korpan harditecon. En Jiĉín, Pilzeno kaj Prago li instruis ĥemion en mezlernejoj.

La artikolon el *Chemické listy* disponigis Z. Pluhař, mi prilaboris ĝin por kolekto de biografioj en Esperantologia kaj Literatura Forumo (ELFo).  
*Miroslav Malovec*

### Oferto de „Leteroj de ELFo 2006-2007“

Al la forumo de ĉeĥaj esperantistoj ŝate okupiĝantaj pri lingvaj kaj literaturaj aferoj de la movado vi estis invitataj en Starto n-ro 1/2006. Aliĝis trideko da agemuloj. La agadon de ELFo detale registris 20 numeroj de la retaj „Leteroj“ aperantaj sub la redakto de Jan Werner. Post du jaroj la iniciato „velkis“, sed en la „Leteroj“, parte ĉeĥlingvaj, parte en Esperanto, estas multaj utilaj dokumentoj. Kelkaj el vi instigis la eldoninton aperigi la „Leterojn“ paperforme. Li do ofertas ĉiujn 20 leterojn kiel broŝuritan volumon (162 paĝoj A4) por senprofita prezo ĉirkaŭ 200 Kč (fiksota laŭ prezoj de multobligo kaj bindo). Kiu deziras ricevi la eldonon, aliĝu ĉe Jan Werner (Dřínová 18, 61200 Brno; rete: [wernerjan@seznam.cz](mailto:wernerjan@seznam.cz)) antaŭ la fino de septembro 2008. La eldonkvanto sekvas viajn antaŭmendojn. we

# LEE CHONG-YEONG

## ne plu inter ni

Prof. d-ro Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto de UEA, sub kies prezidanteco okazis la 81-a UK en Prago 1996, forpasis post elĉerpa malsano la 4-an de julio en la aĝo de 76 jaroj.



Dum la Praga kongreso

Lee naskiĝis la 13-an de februaro 1932, studis ĉe la universitatoj Yeungnam (Koreio), Hawaii kaj Harvard (Usono) kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko en la Universitato de Kobe (Japanio).

Dum sia profesia kariero li estis ĉefo de la merkatumo grupo de la UN-organizo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo, kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato (Korea Respubliko). Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

Lee Chong-Yeong lernis Esperanton aŭtodidakte en 1948. Li estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994-95, 1998-2001), prezidanto de UEA (1995-

1998) kaj vicprezidanto de UEA (2001-2004). Kiel prezidanto de UEA li distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto, kies plena sindediĉo al Esperanto, sincereco kaj persona ĉarmo faris lin amata de ĉiuj.

Li kuniniciatis la unuan Nitobesimpozion en la Universala Kongreso en Prago en 1996 kaj la Manifeston de Prago, kiu, subskribita de pli ol 13000 esperantistoj, plu restas la gvida dokumento pri la celoj de la Esperantomovado. En 1996 prezidanto Lee lanĉis Kampanjon 2000, kiu kune kun la Manifesto de Prago katalizis senteban pliaktiviĝon en UEA kaj la cetera movado.

Lee Chong-Yeong verkis **Esperanto en la 21-a jarcento** (2001), **Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento**; (en la korea, 2001), **Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj**; (2003) kaj **80-jara historio de la korea Esperanto-movado**; (en la korea, 2003), **Ridante lernu**; (2007), kaj **Elektitaj Zamenhofaj proverboj** (2008). Li ankaŭ havis esencan rolon en la estigo de la Esperanta eldono de **Historio por malfermi estontecon** (2007), libro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

En 2004 Lee Chong-Yeong estis elektita honora membro de UEA pro liaj elstaraj meritoj por UEA kaj tutmonda Esperantomovado. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. La ĉina ŝtato dekoraciis lin per la Medalo de Entuziasma Subteno de Konstruo kaj Kunlaboro por Ĉina Amikeco, kaj la prezidento de Vjetnamio per la Medalo de Entuziasma Subteno por la Vjetnama Esperanto-Movado.

*(laŭ retkomunikoj de UEA)*



# KALENDARO 2008

2008-10-03/05 *Kongreso de ĈEA en Přerov*, kun elekto de novaj komitatanoj de ĈEA. Inf.: [jirka.tomecek@post.cz](mailto:jirka.tomecek@post.cz)

2008-10-06/12 *InPaSem /Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice*, [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2008-11-07/09: *KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Dobřichovice)*. Inf.: [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2008-11-28/30: *IKF (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem*, inf.: [m.smycka@seznam.cz](mailto:m.smycka@seznam.cz)

## Ni kondolencas

Ni ricevis informon pri la forpaso de:

- **Marie Zachovalová** el Šternberk (86-jara)

- **Anna Malinová** el Okrouhlice (86-jara)

- **Ing. Josef Mojžíš** el Pardubice (76-jara)

- **Bohuslav Háva** el Liberec (80-jara), multjara kluba komitatano

- **Jaroslav Vácha** (la 7-an de junio 2008, 87-jara), eminenta esperantista filatelisto de EK Příbram.

- **Ing. Pavel Tichý** (la 7-an de julio 2008, 70-jara) el Litomyšl, membro de KELI

- **Soňa Zedníková** (la 31-an de aŭgusto 2008, 80-jara), el Praha

- **Zdeněk Řezáč** (la 3-an de septembro 2008) el Velké Hamry



# Ekumena E-Kongreso

18-a — 25-a Julio 2009

Wrocław, Pollando

IKUE kaj KELI invitas la kristanan esperantistaron al la 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso (EEK) en Wrocław (Vroclavo), Pollando. Ĝi estos samtempe la 62-a kongreso de IKUE kaj la 59-a de KELI.

**fido, espero kaj amo  
espero kristana aŭ monda senespero**

Vroclavo estas unu el la plej grandaj kaj belaj urboj de Pollando. La kongres-ejo estas Porpastra Alta Seminario, kiu situas sur Ostrów Tumski kaj najbaras kun Katedralo de S-ta Johano Baptisto.

En Vroclavo de la komenco de ĝia historio ekloĝis homoj de diversaj landoj kaj religioj. Pace kunvivis katolikoj, ortodoksuloj, judoj kaj protestantoj. Tiel estas ĝis hodiaŭ, la urbo estas vere ekumenisma.

Kunportu viajn Biblion kaj Adoru, bezonatajn por diservoj, preĝoj kaj komunaj kantadoj.

Merkrede okazos tuttaga ekskurso al Świdnica.

La plej avantaĝa kotizo estas pagenda ĝis la fino de 2008 (20 EUR), poste ĝis la fino de marto (30 EUR), post tiu dato 40 EUR. Nemembroj de IKUE/ KELI pagos je 20 EUR pli. Tranoktoj kaj manĝoj varias inter 90 kaj 230 EUR.

**Ĉeĥaj esperantistoj** aliĝu ĉe Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice, [m.svacek@seznam.cz](mailto:m.svacek@seznam.cz), kiu sendos pli detalajn informojn.

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz). Předplatné uhradíte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č. ú. 0017 011 013/0800, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato**: 890,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

**La Gazeto**: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 540,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 320,- Kč.

**Juna Amiko**: 250,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

**Literatura Foiro**: 1000,- Kč (\*650,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Heroldo de Esperanto**: 1080,- Kč (\*700,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

**Femina**: 660,- Kč (\*450,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A 4

**Litova Stelo**: 270,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

**Pola esperantisto**: 360,- Kč, v.s. 07009, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

\*označená cena v závorce platí pro předplatitele mající esperantské občanství (Esperanta civito)

**Periodikum Českého esperantského svazu - 39. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz;**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov  
117, 683 04 Drnovice, 517 385 367,  
hirs@gm.vyskov.cz**

**Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2008**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 39-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
15.11.2008**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## **Naskiĝis nova Esperanto-Muzeo**

En Svitavy estis sabate la 20-an de septembro 2008 inaŭgurita nova muzeo pri historio de Esperanto. En la venonta numero de Starto ni detale priskribos la muzeon kaj ĝian inaŭguron.



*La Majstro ricevas honoran lokon*